

ĈEA-Retkomunikoj 2015/02



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

- [1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO](#)
- [2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO](#)
- [3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ](#)
- [4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ](#)
- [5. NOVAJ FOTOGALERIOJ EN MUZEUM.ESPERANTO.CZ](#)
- [6. NOVAĴOJ EN PAĜO DE ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY](#)
- [ĈE LA SOCIA RETEJO IPERNITY](#)
- [7. ĈEJ AKTIVAS](#)
- [8. LISTO DE ARANĜOJ](#)

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Pasis jam kelkaj monatoj, kiam mi decidis finfine denove sidigi al mia portebla komputilo kaj komenci skribi novan numeron de ĈEA-Retkomunikoj. Pasis eĉ somero, dum kiu vi eble partoprenis la jubilean 100-an UK-on en Lille (Francio) aŭ la 71-an IJK-on en Wiesbaden (Germanio). Sed kion vi trovos en tiu ĉi numero? Precipe mi ŝatus vin, karaj legantoj, nome de la redakta teamo, inviti al pluraj aranĝoj. Kaj ne nur pri ili estos tiu ĉi numero. Kiel tradicie ne mankos ankaŭ interesaj ligiloj al interesaj esperantaj sondosieroj ktp...

Do, agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi numeron de ĈEA-Retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko de la naturo!



**Ĉefredaktoro Miroslav Hruška
dum la 71-a IJK en Wiesbaden**

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi numero de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato KUN KOLORAJ FOTAĴOJ elŝuteblas [ĈI TIE](#).

ARKIVO de Retkomunikoj troveblas [ĈI TIE](#).

3. MALLONGAJ AKTUALAĴOJ

3.1 „KUN ESPERANTO ĈIRKAŬ LA MONDO“ - INVITO AL INAŬGURO DE LA NOVA EKSPozICIO EN ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY SABATE LA 26-AN DE SEPTEMBRO 2015!

Ni elkore invitas vin al bunta kultura, kleriga kaj amuza programo, kiu estas TUTE SENPAGA (krom vingustumado surpace)! La plej freŝaj detalaj aktualigitaj informoj troviĝas en [„KALENDARO DE ARANĜOJ“](#).

Ne malatentu, ke limdato por tranokto estas nepre 15.9. kaj por rezervado de sidloko en saloneto por tagmanĝo estas 23.9. (ambaŭ ĉe svitavy@esperanto.cz).

Viaj fotokontribuaĵoj, kiuj dokumentas avantaĝojn kaj specifaĵojn de Esperanto dum vojaĝado kaj ekkonado de la mondo estas daŭre bonvenaj kaj dezirindaj, ne prokrastu la okazon por via prezentiĝo – la muzeo ja estas nia komuna projekto! (Limdato ĝis 15.9. ĉe muzea.ekspozicio@gmail.com).

3.2 LA 1-A LIMDATO POR ALIĜO AL ANSTATAŬA ĈEA-KONGRESO EN ÚSTÍ NAD ORLICÍ (6.-8.11.) ESTAS LA 30-A DE SEPTEMBRO!

Bonvenon al ĉarma urbeto surlime inter Ĉeĥio kaj Moravio, el kiu eble plej multaj konas nur ĝian stacidomon – en ĝi ni renkontiĝos denove post unu jaro dum la pinta aranĝo de nia asocio. La aranĝo okazos ĉiukaze (ĉu kiel Kultura Konferenco, ĉu kiel Anstataŭa Kongreso – vidu klarigon en la ĈEA-retejo kaj Starto 2015/1 kaj 2)!

Detalaj aktualaj informoj troviĝas en la [„KALENDARO DE ARANĜOJ“](#).



Urbdomo en Ústí nad Orlicí (aŭtoro Radek Bartoš)

Bv. uzi prefere [„ELEKTRONIKAN ALIĜILON“](#) kaj laŭeble ne maltrafu la unuan, finance plej avantaĝan limdaton – 30.9!

Pritraktotan (ĉeĥlingvan) proponon de la nova statuto de ĈEA vi povas elŝuti kaj esplori [„EN TIU ĈI ARTIKOLO“](#)

Por la ĝenerala raporto ni petas klubojn, sekciojn, laborgrupojn aŭ aktivajn unuopulojn pri sendo de aktualaj informoj pri viaj gravaj lastjaraj aktivecoj, inkl. ev. fotoĵojn, kaj pri planoj kaj proponoj por la sekva jaro- koncerne projektojn, renkontiĝojn ktp (kontakto: pavla.dvorakova@esperanto.cz). Ni (ĝoj)atendas vian partoprenon kaj vian emon al kunagado – ĉar „LA ASOCIO NE ESTAS NUR LA KOMITATO, SEN NI ĈIUJ!“

3.3 INVITO POR LOĜANTOJ DE PRAGO KAJ TIES ĈIRKAŬJO AL ĈEĤLINGVA PRELEGO

V úterý 15. 9. od 18:00 hodin se bude konat v sále Unitaria, Anenská 5, Praha 1, přednáška Petra Chrdleho v češtině o Přemyslu Pittrvi pod názvem "Apoštol lásky. Život a dílo Přemysla Pittra v koláži dobových fotografií". Samozřejmě bude zmíněn i vztah Přemysla Pittra k esperantu a kniha Karla Krafta "Heroo de amo". Kdo se chce dozvědět něco víc o muži posmrtně jmenovaným Uneskem "Evropský humanista", nositeli nejvyšších izraelských a německých vyznamenání a zachránce více než 800 židovských, německých a českých dětí, je srdečně zván.



Busto de Přemysl Pittra en Norimberko

4. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

Ni invitas vin al regulaj vizitoj ĉe <http://www.esperanto.cz/eo/aktuality> kaj informas vin pri la novaj artikoloj el la lastaj semajnoj:

Artikoloj en esperanto en www.esperanto.cz



Videoj el la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lille

Kun plezuro ni peras al vi ligilojn al interesaj videoj el la programo de la jubilea 100-a Universala Kongreso, okazinta en Lille. La videoj troviĝas sur la kanalo de Germana Esperanto-Asocio ĉe Youtube.

Nova amuza projekto de E@I



Per tiu ĉi aktualaĵo ni ŝatus informi vin, ke komence de marto 2015 estis lanĉita nova projekto de organizo E@I.

Netradicie ja ne temas pri tre serioza projekto, kiel en kazo de projektoj por lerni por lerni la slovakajn aŭ germanajn lingvojn. Ankaŭ ĝi ne celas prezenti vegetarajn aŭ veganajn receptojn, kiel ni jam informis en aktualaĵo de pasintjara marto.

Novaj sonregistraĵoj en la projekto "Karel Čapek"

Jen kvin plej novaj sonregistraĵoj el la cifereciga ĈEA-projekto dediĉita al la ĉeĥa verkisto Karel Čapek (1890–1938) – nome pluaj „Rakontoj el la dua poŝo“. La voĉo apartenas al Vladimír Türk, la ĉefa realiganto de la projekto.

Publikigite okaze de lia naskiĝtago kun multaj bondeziroj nome de ĈEA kaj danko por lia senlaca precizema meritplena laboro!



Hundo, kiu scipovas kalkuli!

Tio ne estas ŝerco! KREDU NE KREDU, sed en Ĉeĥio vere estas hundo, kiu scipovas kalkuli! En urbo Česká Třebová vivas sinjorino Zdenka Novotná, kiu parolas al ŝia hundino, pudelino Kati nur en esperanto. Ŝi eĉ scipovas kalkuli (adicii, subtrahi, multipliki kaj onigi), kiel oni povas vidi de tiu ĉi video – parto el pli longa video, kiu estis filmita dum kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en oktobro 2014 en urbo Prostějov.



WINDOWS KAJ ESPERANTO - helpu per via voĉo!

Svisa entrepreno Allsprachendienst Esperanto GmbH, gvidata de konata esperantisto Dietrich Weidmann, submetis al MICROSOFT proponon por enkonduko de Esperanto-subteno por la programoj Windows kaj Office, kaj petas nun, ke multaj uzantoj subtenu la proponon, tiel ke Microsoft konsideru la aferon serioze. Sufiĉas malpli ol unu minuto de via rara tempo!

Nur ĉeĥlingvaj artikoloj:



O esperantu v ĉeských médiích a na internetu

(Pri Esperanto en ĉeĥaj medioj kaj interreto)

Přinášíme vám na odkazy na články, které vyšly v r. 2015 zejména v regionálních denících (a nebylo o nich pojednáno ve zvláštní aktualitě) a v souvislosti s putovní výstavou „Je esperanto mrtvý jazyk?“. Nechybí ale i zpráva o zajímavé akci na Masarykově univerzitě, nový rozhovor o esperantu v ČR Vysočina (tentokrát s Miladou Zemanovou) i dvě kuriozity na závěr ...



Návrh nových stanov ČES

(Propono de nova statutararo de ĈEA)

V příloze tohoto článku je k dispozici k prostudování návrh nových stanov ČES, které budou schvalovány na letošním sjezdu a které vypracovala loni zvolená pracovní skupina.

Knižní novinky 2015



(Libraj novaĵoj en jaro 2015)

Přinášíme vám informace o nových titulech, vydaných letos klasickou i elektronickou formou, na jejichž vzniku se autorsky či překladatelsky podíleli členové ČES a AEH. Nabídneme vám novou čítanku, zajímavou autobiografii, gastronomický slovník, překlad vybraných recenzí a části románu „Jan Hus“ od Evy Kantůrkové i překlad nové úspěšné divadelní hry „Pohřbívání“ od Blanky Fišerové ...

Britská královna zaslala blahopřání ke Dni esperanta

(Brita reĝino sendis gratulon al la Tago de Esperanto)



26. července je v mnoha zemích slaven Den esperanta, neboť právě tento den v r. 1887 byla vydána první učebnice tohoto jazyka, určeného pro podporu spravedlivé komunikace a porozumění mezi národy. Letos se ke gratulantům připojila i britská královna Alžběta II. Jakou roli hraje či potenciálně může hrát esperanto ve světě, který nyní (zdánlivě) ovládá angličtina? Co motivuje rodilé mluvčí angličtiny, aby se esperanto naučili a používali? Jak může esperanto přispět k odstranění jazykových bariér a k lepšímu porozumění mezi příslušníky různých národů a vyznání? (zdroj foto – volné dílo)



Tisíc nových studentů esperanta denně na portálu DUOLINGO

(Miloj da novaj studentoj de Esperanto
ĉiutage ĉe paĝaro Duolingo)

Duolingo je oblíbený vícejazyčný portál pro bezplatnou výuku jazyků, fungující rovněž ve verzi pro mobilní telefony a iPhony. V naší aktualitě z října minulého roku jsme vás informovali o přípravě kurzu esperanta na bázi angličtiny na tomto portálu. Projekt byl spuštěn 28. května 2015 a od té doby se do nového kurzu esperanta přihlásilo 60 000 kurzistů za měsíc a půl a každý den přibývá tisíc dalších. Viz Duolingo.com.



Mezinárodní filmová soutěž "Čaj a láska"

(Internacia filmkonkurso "Teo kaj amo")

Mezi vítězi mezinárodní soutěže krátkých filmů, vyhlášené čínským rozhlasem (China Radio International) na téma „Čaj a láska“ (Teo kaj amo) se umístil snímek redaktora Verda Stacio Pavla Kačšáka, natočený v esperantu na zámku Bartošovice s dětmi z místní školy.



O esperantu v ostravském rozhlase

(Pri Esperanto en radio de Ostrava)

27.2.2015 v rámci pořadu „Křížem krázem“ odvysílal ostravský rozhlas pořad věnovaný esperantskému pomníku, který se nachází v Rottrově sadu v Ostravě-Zábřehu. Nejen o něm, ale i o esperantu obecně a o historii a současnosti esperanta regionu si povídala redaktorka Petra Štrymplová s historikem Tomášem Majlišem a s Jaroslavem Suchánkem, bývalým velvyslancem ČR v Austrálii a členem esperantského kroužku v Ostravě. Zveme vás k poslechu pořadu i k přečtení doprovodného článku na webu rozhlasu.

5. NOVAJ FOTOGALERIOJ EN MUZEUM.ESPERANTO.CZ

[Obálky / Kovertoj](#)

[Dopisnice \(Korespondenční lístky s přitisky\) / Poštarktoj](#)

[Poštovní známky s esperantskou tematikou / Esperantaj poŝtmarkoj](#)

[Samolepky / Glumarkoj 1909-1989](#)

Zemřel Jiří Patera

(Forpasis Jiří Patera)



Se smutkem oznamujeme, že 6. června 2015 ve věku 79 let nás po těžké nemoci navždy opustil čestný člen Českého esperantského svazu, dlouholetý předseda Pražského klubu esperantistů, redaktor a překladatel pan Jiří Patera. Poslední rozloučení s ním se koná ve čtvrtek 11. června v 11:20 v Malé obřadní síni v Praze-Strašnicích.

Vzpomínka na oběti 2. světové války z řad esperantistů



(Memoro omaĝe al esperantaj viktimoj de la dua mondmilito)

Za války české esperantské hnutí přišlo o nemálo svých čelných zástupců i řadových členů. Vzpomeňme jmenovitě alespoň některé z nich, kteří si zaslouží, aby námi nebyli zapomenuti.

6. NOVAĴOJ EN PAĜO DE ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY ĈE LA SOCIA RETEJO IPERNITY

Fotoalbumoj:

[La 100-a UK en Lille](#)

Videoj:

[Ĉeĥa ĥoralo Sankta Venceslao](#) - kantas Miroslav Smyčka - diskonigite omaĝe al lia naskiĝtago

[IJK Wiesbaden 2015](#)

[Edmond Privat - Unua Kongreso de Esperanto](#)

[Invito al la 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO - LILLO 2015](#)

[Rememoro](#) - sukcesinta konkursfilmo de Pavol Kaščák por la ĉina festivalo "Teo kaj amo"

[Nigra Libro \(Zwartboek - Black Book\) - Antaŭfilmo](#)

[Mikaelo Povorin - Printempa melankolio](#)

[Bravaj Falkoj \(Hej sokoly\) - konata ukrainia/pola kanto kun subtekstoj](#)

Muzikaj sonregistraĵoj:

[Pluva nub' \(Aloha oe\)](#) - havaja kanto - el la eldonota kompaktdisko de la Sekcio de nevidantoj de ĈEA, kantas I.Karašová kaj M.Jelínková, pianludas T.Karaš

[Mikaelo Bronštejn kantas dum la ILEI-Konferenco en Ostendo 2015](#)

[L.L.Zamenhof - Ho mia kor' \(muzikigita - kun vera korbatado\)](#) - en muzikigo kaj interpreto de Pavla Dvořáková

[Mariana \(kroata kanto\)](#) - kantas partoprenantoj de la Lingva Seminario en Skokovy

[Antonín Sova \(1864-1928\) - Pastoralo \(muzikigita poemo\)](#) - en muzikigo kaj interpreto de Pavla Dvořáková

[Kantregistraĵoj el Skokovy ĉe Soundcloud.com](#)

["Vojo al Okoř"](#) (Na Okoř je cesta) ["Ruĝa rivero"](#) (Červená řeka)

["Vojfarist"](#) (Na silnici do Prášil)

Parola vorto:

[Pedro Zurita - Esperanto kaj blinduloj](#) - prelego dum la 86-a SAT-Kongreso en Madrido

[Intervjuo kun Chuck Smith pri Duolingo, impona lingvoinstrua retejo](#)



Emblemo de la IJK en Wiesbaden

7. ĈEJ AKTIVAS



(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Václav ZOUZALÍK)

Inter la 24-a kaj 26-a de aprilo okazis en urbo Svitavy renkontiĝo Centrejo 2 okaze de 10-a datreveno de fondo de ĈEJ.

Je la 25-a de aprilo okazis Ĝenerala Asembleo de ĈEJ. Krom ŝanĝo de statuto de ĈEJ la asembleo ankaŭ decidis pri oferto de honora membreco al tri fondaj membroj de ĈEJ: Dagmar MATĚJŮ (denaske CHVÁTALOVÁ), Marek BLAHUŠ kaj Tomáš BRICHÁČEK.

Kvin el niaj membroj partoprenis jubilean 10-an Someran Esperanto-Studadon en slovakia urbo Martin. Kompreneble ĉi tie ne povis niaj membroj resti nur kiel pasivaj konsumantoj, sed prizorgis drinkejon, preparis prelegojn, gvidis kurson de ĉeĥa lingvo, ktp.

Niaj membroj ankaŭ partoprenis ĉijaran IJK-on en Wiesbaden okazitan ekde la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto. Rilate al tio ni ankaŭ organizis "Okcidentan Karavanon" al kiu aliĝis ankaŭ esperantistoj el Slovakio.

Praga klubo de ĈEJ rekomencos regule renkontiĝadi ekde la 24-a de septembro. La renkontiĝoj okazos ĉiuŝaŭde ekde la 19-a horo en klubejo je adreso Ve Smečkách 25. Ekde oktobro Praga klubo de ĈEJ okazigos publikajn kursojn de Esperanto. Pli da informoj pri la kurso aperos baldaŭ sur nia retejo.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://mladez.esperanto.cz/>


ĈEJ aktivas estas disponebla laŭ permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0.

Tutmonde <https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eu>



Komuna foto de partoprenantoj de la 71-a IJK en Wiesbaden, kiuj parolas la ĉeĥan aŭ slovakian lingvon

8. LISTO DE ARANĜOJ



2015-09-11/13 Renkontiĝo de la Katolika sekcio de ĈEA

2015-09-26/27 "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" en Svitavy

2015-10-01/04 La 4-a Internacia Esperanta Lernejo en Bartošovice

2015-10-19/25 La 42-a Lingva Seminario

2015-11-06/08 Kultura Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Limdato por povi ĝui plej avantaĝan kongreskotizon nehaltigeble alproksimiĝas! Nur ĝis septembro 30, 2015.

Tuj aliĝi ĉe: <http://esperanto.cz/aligxilo2015>

2015-12-05 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek

2015-12-06 La 8-a Marcipana Kristnasko en Svitavy

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

ĈEA-Retkomunikoj 2015/02

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – retkomunikoj@esperanto.cz

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš, Václav Zouzalík